Alexei, Russlanddeutscher

<https://www.ndr.de/kultur/programm/Europaeischer-Tag-der-Sprachen-Eine-schwedisch-russische-Familie-erzaehlt,tagdersprachen100.html>



**26. September 2022**

**Veranstaltungen zum Europäischen Tag der Sprachen**  
Esperanto als ergänzende Sprache - mehr Sprachengerechtigkeit in der EU

Informationsabend über den Beitrag zur Sprachengerechtigkeit, welchen die internationale Plansprache

Esperanto im Rahmen der Europäischen Union und ihrer Mitgliedsstaaten leisten kann.

<https://edl.ecml.at/Events/EventsDatabase/tabid/1772/EventID/26326/Country/DE/language/de-DE/Default.aspx>

**19. September 2022**

**Die Bremer Stadtmusikanten auf Esperanto**

<https://www.tamakai-books.de/de/Zu-guter-Letzt/die-bremer-stadtmusikanten-esperanto-ausgabe.html>



**19. September 2022**

**Ö1 ORF Sprachliches Hoffnungsfeld Esperanto**

Zur Geschichte der internationalen Plansprache

<https://oe1.orf.at/programm/20220919/693761/Sprachliches-Hoffnungsfeld->

Esperanto

weitere Sendetermine

<https://oe1.orf.at/suche?query=esperanto>

**13. September 2022**

**SALUTON**

Eine Bekleidungsfirma hat eine originelle Idee

<https://www.pinterest.de/pin/saluton-hello-in-esperanto-retro-text-pullover-hoodie-t-shirt-sweatshirt-tank-top-racerback-dolman-in-2022--878976052247207516/>



**1. Juni 2022**

**Darmstadt**

Am Pfingstwochenende nutzte die Esperantogruppe Darmstadt eine Mitfahrgelegenheit im Bus der Delegation des Orplid-Darmstadt zu einem Besuch ihrer befreundeten Esperantogruppe

<https://www.darmstadt.de/>

[standort/vielfalt-internationale-beziehungen/internationale-beziehungen/staedtepartnerschaften](#)



**La urbaj muzikistoj de Bremen**



EDITION TEMMEN

**Welt der Bücher und Zeitschriften – Esperanto und andere Plansprachen**

## Aktuelles, Wissens- und Bedenkenswertes aus der Deutschen Esperanto-Bibliothek Aalen

**Folge 69 – Legendoj legindaj, ĉu?**

Jarfine de 2022 aperis jena libro de la Vroclava Eŭropa Centro de Interkultura Edukado sub gvido de ĝia prezidantino Małgorzata Małgosia Komarnicka: **Legendoj de ses kontinentoj**. (Wrocław: Wrocławskie Centrum Rozwoju Społecznego, 2022. 166 p. - ISBN 978-83-954307-4-9, en la Pola kaj en Esperanto).

Tuj, kiam mi estis leginta la titolon (kaj ne nur tiun, sed poste la tutan kompletan) de tiu plej nova eldonaĵo, mi demandis min, ĉu ili intence prenis tiun vortumon, eble pro la specifa signifo de la esprimo „legendoj“. Tial mi rezonis pri la origino de tiu esprimo, kiun ja bele klarigas al ni la t.n. etimologio, kiu pritraktas la devenon de iuj nocioj. En la kazo de legendo, ĝi tute ne kontestas, ke la esprimo originas en la lingvo Latina.



Laŭ la Latina, **legendo** priskribas iun **legindafon**. Tamen la Esperanto-sufiksoj ne faciligas la aferon. Per aldono de **-end-** ni ja substrekas, ke la enhavo de teksto estu legata, do oni nepre legu ĝin. Per aldono de **-ind-** ni rekomendas legi ĝin, ĉar ties enhavo meritas la atenton. Sed se oni parolas pri figuro en iu legendo, tiam temas pri legenda heroo, simile oni ankaŭ povus uzi la adjektivon por raportoj pri la legenda teksto-enhavo. Sed kompreneble ne nur tekstoj de legendoj estu legataj, ĉar ekzistas ja pli-pli multaj tekstoj legendaj, kies enhavo ne temas pri legendo, do pri iu **rakonto pri malnovaj okazaĵoj**, en kiu historiaj faktoj estas intermiksitaj kun imagitaj mirindaĵoj.

Mian pritakson, ĉu la libro estas leginda, almenaŭ por mi, tion vi legos fine de la kontribuo.

Laŭ titolo nin atendas 21 legendoj el 6 kontinentoj, sed la nun aperinta unua volumo enhavas 7 landojn en 3 kontinentoj; kiujn prezentos la dua volumo, tion ni devas atendi. Koncizaj priskriboj karakterizas ĉiun landon. Finaj ĉapitroj klarigas la historieton de Esperanto – **de malgranda lernolibro ĝis tutmonda movado** kaj informas pri la kontribuintaj personoj (ilustristinoj, rakontintoj, tradukintoj).

La legantojn eble ankaŭ interesas la genezo de la tuta afero, kies kulmino fine estas la libro presita. La Eŭropa Centro de Interkultura Edukado, enkadre de municipa Vroclava Centro de Socia Disvolvigo, realigis projekton por la pliaĝuloj, nome **Feliĉaj, kreivaj kaj aktivaj**. Tiel oni celis instigi en la homoj la kreaan esprimon de sentoj, de pensoj, per formado de konkreta artaĵo, dum ili distanciĝas de la ĉiutageco per grupa integriĝo.

Tion oni atingis en renkontoj kun Esperantistoj el aliaj landoj, kiuj rakontis pri siaj hejmlandoj kaj prezentis ekzemplojn

de landaj legendoj. Poste sekvis tasko por la partoprenantoj: ili ilustru per propraj artaĵoj la aŭskultitajn legendojn aŭ ties heroojn. Montriĝis, ke tio tre pozitive influis kaj stimulis la pliaĝulojn; kreskis iliaj kreiveco, observa sentumo, sento de estetiko, esprimeblo de emocioj. Apude, reduktiĝis ĉiutaga streĉo kaj liberiĝis la vivĝojo; simple tiel ili povis forsalti el la ĉiutageco.

Ne indas nun dissterni la enhavon de la 21 tekstoj, kaj al mi simple ne eblas priskribi la multajn tre diversajn ilustraĵojn, aŭ prefere: artaĵojn. Sed mi volonte substrekas jen la aserton, ke plej plaĉis al mi la miksaĵo inter prezentoj de legendoj kaj akompanaj bildigoj, kiuj pruvigas, ke la legendoj inspiris homajn fantaziojn, pensi pri ili kaj sekve produkti ekvivalentojn en alia arta formo.

Se mi nepre devus montri 1-2 ekzemplojn, jen ili, kiuj plej impresis min:



Varsovio (Renata Gładysiewicz)



La lago de la trezoroj (Renata Gładysiewicz)  
Eble la legantoj kredas, ke mi varme rekomendas la akiron kaj ĝuon de tiu libro.  
**Utho Maier**

## Kalendaro

### Januaro 2023

**12. Januaro en Hamburgo, Germanio:** Degelo de la tundro rekte minacas klimaton. Legado kaj diskutado 19:30 – 21:00 en Kulturladen St. Georg, Alexanderstr. 16, 20099 Hamburg. Informoj: [info@esperanto-hamburg.de](mailto:info@esperanto-hamburg.de)

**16. (rete): GEA.juna Zoom-kunvenobabilrondo por mezaĝaj Esperantistoj** (parte ankaŭ en la germana lingvo) La evento okazas ĉiam en la tria lundo de la monato inter la 20-a kaj 21-a horo. Informoj: [michaela.stegmaier@esperanto.de](mailto:michaela.stegmaier@esperanto.de)

**19. (rete): Surinamo: Nederlanda spuro en Ameriko.** Legado kaj diskutado. Reta renkontiĝo de 19:30 – 21:00 h (UTC+1). Bonvolu demandi la enireblecon kaj enirkodon je: [info@esperanto-hamburg.de](mailto:info@esperanto-hamburg.de)

**26. Januaro en Hamburgo, Germanio:** Maristaj botoj inter narcisoj. La insuloj de Scilly. Legado kaj diskutado 19:30 – 21:00 en Kulturladen St. Georg, Alexanderstr. 16, 20099 Hamburg. Informoj: [info@esperanto-hamburg.de](mailto:info@esperanto-hamburg.de)

### Februaro 2023

**2. (rete): La malkovro de insulino.** Legado kaj diskutado.

Reta renkontiĝo de 19:30 – 21:00 h (UTC+1). Bonvolu demandi la enireblecon kaj enirkodon je: [info@esperanto-hamburg.de](mailto:info@esperanto-hamburg.de)

**6. Esperanto-kurso kaj babilrondo.** 19:30 – 21:00 en Haus der Kulturen e.V., Am Nordbahnhof 1A, 38106 Braunschweig. Tie ni renkontiĝas ĉiun kvaran lundon por kune lerni kaj praktiki Esperanton. Nian eventon oni trovas ankaŭ en la retejo de [hdk-bs.de](http://hdk-bs.de), en [nebenan.de](http://nebenan.de) kaj aliaj sociaj retejoj. Se hazarde vi preterpasas la urbon dum la unua lundo de la monato, vi povos viziti nin.

**20. GEA.juna Zoom-kunvenobabilrondo por mezaĝaj Esperantistoj** (parte ankaŭ en la germana lingvo). La evento okazas ĉiam en la tria lundo de la monato inter la 20-a kaj 21-a horo. Informoj: [michaela.stegmaier@esperanto.de](mailto:michaela.stegmaier@esperanto.de)

### Aprilo 2023

**03-10: PSI, Printempa Semajno Internacia** en Wittenberg, Germanio

### Majo-Junio 2023

**26-29 (-6 Junio). 100-a Germana Esperanto-Kongreso** en Braunschweig, Germanio



## GEA@YouTube – Novaĵoj: Alinomoj, ŝatoj kaj abonoj

La aliro al la YouTube-kanaloj de la Germana Esperanto-Asocio nun estis simpligita per la enkonduko de YouTube-alinomoj („alias“, mallongaj nomoj), tedaj serĉoj aŭ tajpado de kriptaj URL-oj ne plu necesas.

La sekva mallongaj nomoj estas novaj por ekzistantaj YouTube-kanaloj de la GEA (vidu ankaŭ *Esperanto aktuell* 2/2022 p. 8):

1. Deutscher Esperanto-Bund Sehenswertes = [www.youtube.com/@gea\\_vidindajxoj](http://www.youtube.com/@gea_vidindajxoj)
2. GEK - Germana Esperanto Kongreso = [www.youtube.com/@gea\\_kongresoj](http://www.youtube.com/@gea_kongresoj)
3. PSI - Printempa Semajno Internacia = [www.youtube.com/@gea\\_psi](http://www.youtube.com/@gea_psi)

Ni intertempe kolektis multajn interesajn filmetojn, kiujn vi volonte povas spekti. Vi ankaŭ povas aboni la YouTube-kanalojn atingiblajn per la mallongaj nomoj, do vi scios kiam novaj videoj estas ligitaj. Kaj se vi ŝatas filmeton, vi estas bonvena lasi ŝaton („Like“) por ĝi. La nombro da kanalaj abonoj kaj la nombro da ŝatoj de videoj en la kanalo influas la YouTube-rangon, do la GEA-kolektoj pli bone troviĝas en serĉoj ene de YouTube. Amuziĝu kun ĝi –

Stefan Krieghoff por la komisiono GEA.IT

## D.E.B.@YouTube – Neuigkeiten Aliase, Likes und Abos

Der Zugang zu den YouTube-Kanälen des Deutschen Esperanto-Bundes ist jetzt durch die Einführung von YouTube-Aliassen (Kurznamen) vereinfacht worden, umständliches Suchen oder die Eingabe kryptischer URLs entfällt dadurch.

Nu sind die folgenden Kurznamen für bereits vorhandene YouTube-Kanäle des D.E.B. (siehe auch *Esperanto aktuell* 2/2022 S. 8):

1. Deutscher Esperanto-Bund Sehenswertes = [www.youtube.com/@gea\\_vidindajxoj](http://www.youtube.com/@gea_vidindajxoj)
2. GEK - Germana Esperanto Kongreso = [www.youtube.com/@gea\\_kongresoj](http://www.youtube.com/@gea_kongresoj)
3. PSI - Printempa Semajno Internacia = [www.youtube.com/@gea\\_psi](http://www.youtube.com/@gea_psi)

Wir haben inzwischen viele interessante Videos gesammelt, die ihr euch gerne anschauen könnt. Die über die Kurznamen erreichbaren YouTube-Kanäle könnt ihr auch abonnieren, dadurch erfahrt ihr, dass neue Videos verlinkt wurden. Und wenn euch ein Video gefällt, könnt ihr gerne ein Like dafür hinterlassen. Die Anzahl der Kanal-Abos und die Anzahl der Likes von Videos in den Kanälen beeinflusst das YouTube-Ranking, so dass die D.E.B.-Sammlungen bei Suchen innerhalb von YouTube besser gefunden werden. Viel Spaß damit –

Stefan Krieghoff für die GEA.IT-Kommission

## Enkonduke Michael Vrazitulis

**Kara leganto! En tiu ĉi eldono de ·kune· vi povas trovi du raportojn kaj plurajn fotojn de la 30-a KEKSO, kiu okazis en Kirkel (Sarlando) dum la antaŭlasta semajnfino de oktobro.**

Plue, mi konsilas al vi legi la raporton de GEJ-aktivulo Paul pri sia vizito de la kunveno de landaj ligoj kaj fakaj asocioj de Germana Esperanto-Asocio en Herzberg am Harz, komence de novembro. Sekvas ĝisdatigo de Viktoria pri la nuntempa laboro por renovigi nian retan kurson Kostenloser Esperanto-Kurs. Kiel GEJ-estraro, ni

krome elkore invitas vin aliĝi al Junulara E-Semajno (JES) 2022/’23 por festi la silvestron kun ni kaj por ĉeeste partopreni nian membromembrolon tie; pli detalajn informojn pri tio vi ankaŭ povas legi poste. Cetere, nepre ĝuu la pensigan eseon de Henri pri tio, kial grandaj ideoj, celantaj ŝanĝi la mondon, perdis sian allogecon post la fino de la epoko de Moderneco. Se tio ankoraŭ ne estis sufiĉe da „kulturema“ enhavo por vi, tuj poste vi trovos recenzon, verkitan de Paul pri ekspozicio en la Ŝtata Ĉefarkivo de Stutgarto, tributa al la humanisto Johannes Reuchlin. Fine, Lino raportas pri plia junulara evento, okazinta antaŭ nelonge, Klač-Kunveno Post-Somera (KKPS) en Delft, do en Nederlando, kaj paralele realiĝinta seminario pri mastrumado de organizoj.

Ĝuu la legadon, kaj espereble ĝis revido en iu el la diversaj junularaj renkontiĝoj – ĉu ĉeestaj, ĉu retaj – kiuj okazos baldaŭ!

Via ·kune·-redakcio



## Impresoj de 30-a KEKSO en Kirkel

Lucile Brobeck (Lulu)

Mi estas Lulu el Francio, kaj mi partoprenis la 30-an KEKSO-n! Ĝi estis en la germana urbeto Kirkel, ne tro for de Saarbrücken.

Kun pli-malpli 30 aliaj junaj homoj el multaj landoj, ni pasigis du tagojn kune! Mi partoprenis en ateliero pri sociaj retoj, kiu okupis duonon de la tempo. La du gvidantoj prezentis al ni la malsimilajn sociajn retejojn, kiaj estas iliaj vizitantoj kaj kiel uzi ilin. Precipe, ni lernis kiel krei „reels“ (filmetetoj) en Instagramo. Tiuj atelieroj vere kuraĝigis min krei enhavon. Mi nun kreas memojn, kaj havas projekton por fari multe pli ol nur memojn. Jen rapida varbado: sekvu @mojosatestudo sur Instagramo! Mi tamen bedaŭras, ke ne estis pli da tempo por kune krei ion. Mi vere bezonus konsilojn kaj komentojn por plibonigi mian projekton.

Mi precipe memoras du eventojn: la tablo-piedpilka turniro, kaj la vizito de la kastelo. Je la du eventoj mi sentis min ege bona kaj ĝoja!

Mi multe ĝuis la etoson de tiu renkontiĝo: ĝi estis eta evento, kreita de junuloj por junuloj, kun multe pli da naciecoj kaj novuloj, ol kiom mi atendis. Tio kaŭzas, ke oni vere povas ekkoni la homojn, multe pli ol dum aliaj, grandaj eventoj.



Esperanto-lingvokurso por komencantoj.

## Utku Özdemir

Dum la antaŭlasta semajnfino de Oktobro (21.–23.10.) okazis la 30-a Kreema Esperanto-Kurso (KEKSO) en Kirkel, Germanio. Ĉi-foje, la evento estis kunorganizita de la germana (GEJ) kaj la franca (JEFO) landaj sekcioj de TEJO. La urbeto Kirkel, situanta en la germana regiono Saarland kaj proksime al la german-franca landlimo, estis geografie avantaĝa por vojaĝoj de ambaŭ organizintaj landoj. Plejmulte de la partoprenintoj venis nesurprize el Francio kaj Germanio, tamen ankaŭ loĝantoj de aliaj diversaj landoj kiel Belgio, Italio kaj Hispanio ĉeestis. Menciinda estis la koincido, ke en la 30-a KEKSO partoprenis ekzakte 30 esperantistoj, 15 inoj kaj 15 iĉoj.

La gastejo, Haus Burgblick, ofertis komfortan loĝadon kaj gastigis preskaŭ nur esperantistojn dum la evento. De la aĉetado, kuirado ĝis la purigado la partoprenintoj kaj organizintoj kune laboris kaj la kunlaboro plifortigis la familian, amikan etoson. Kiel kutime ĉe KEKSO-j, multaj keksoj kaj fruktoj estis kunportitaj el diversaj landoj. Estis agrable havi tablon kun tiaj dolĉaĵoj, ne nur pro la bezono manĝeti dum la tago, sed ankaŭ pro la eblo gustumi manĝaĵojn de diversaj kulturoj.

Post la alvenoj de la partoprenantoj, la evento oficiale komenciĝis per interkonaj ludoj, kiel la tiel nomata „hombingo“. Tion sekvis la vespermanĝo kaj poste la babilado kaj ludado plu daŭris en la gufujo/trinkejo.



Prezento de venontaj junularaj eventoj dum vespermanĝo.



Keksoj kaj fruktoj kunportitaj de KEKSO-partoprenantoj.



Trejnado pri profesia uzo de sociaj retoj.



Ekskurso al Saarbrücken dum lasta tago de KEKSO.

Aldone, vendredon nokte, tablo-piedpilka turniro estis organizita, al kiu eblis aliĝi kiel duopaj teamoj. Ankaŭ pri la tabloteniso la intereso estis sufiĉe granda. Sabate kaj dimanĉe la programo de la 30-a KEKSO konsistis ĉefe el Esperanto-kurso por komencantoj ĝis fruaj progresintoj kaj trejnado pri profesia uzo de sociaj retoj.

Pluraj prelegoj kaj atelieroj okazis dum la trejnado. Ĝenerale temis pri kiel difini aŭ atingi celgrupojn interrete, kiel funkcias la algoritmoj, reklamadoj, retejaj kuketoj de diversaj sociaj retejoj; kaj kiel plej efike dizajni afiŝojn por anonci, varbi pri io ajn. Dum atelieroj la trejnitoj povis kontribui per kreado de afiŝoj, TikTok/Reels-filmetoj. La trejnado estis prezentita de fakuloj, de Ana Ribeiro kaj Jordi Calafi, kiuj profesie laboris aŭ aktivis pri la agado ĉe sociaj retoj. Samtempe la Esperanto-kurso okazis en alia loko de la gastejo kaj ebligis al la komencantoj plibonigi siajn lingvokapablojn. La kurso ne nur enhavis klasĉambrajn lecionojn, sed ankaŭ ludojn (ekz. trezorĉasadon en la gastejo), kaj teamlaboraj aktivaj estis uzitaj. Dum la vespermanĝo sabate, la venontaj proksimaj Esperanto-eventoj (inkluzive JES, 31-a KEKSO, IJK, UK, katalunaj kaj italaj kongresoj) estis prezentitaj.

Kadre de la 30-a KEKSO okazis du ekskursoj. La unua estis nokta promenado al la kastelo de Kirkel. Malgraŭ la iom malvarma vetero, ni ĝuis vidi la urbetan panoramon kaj amuziĝi ekstere. Dimanĉon posttagmeze, la lasta programero de la evento estis la ekskurso al Saarbrücken,



Forvojaĝo de Carina, Paul, Michaela kaj Utku.

la ĉefurbo de la regiono Saarland. Bonŝance ne pluvis kaj ni povis vidi la belan urban pejzaĝon de diversaj lokoj. Post kelkaj horoj en Saarbrücken, mi kaj aliaj, kiuj planis vojaĝi dimanĉe, adiaŭis kaj veturis hejmen. Tamen alia grupo de partoprenintoj restis en Kirkel plian nokton kaj ekveturis lunde matene.

Kiel mi persone profitis de la 30-a KEKSO? Kompreneble, surloke renkontiĝi kun geamikoj, kiujn mi ekkonis dum la lasta IJK, estas ĉiam bonvena, agrabla sperto. Aldone, mi konatiĝis kun multaj novaj geamikoj. Ĉar mi relative nove komitataniĝis ĉe GEJ, ankaŭ estis grave babilo, diskuti kun estroj kaj anoj pri temoj rilate al la germana landa sekcio. Indas menci, ke la trejnado estis profesie farita kaj helpis al ni akiri novajn kapablojn, vidpunktojn. Do, kara leganto, se vi volas iĝi parto de nia verda-blanka familio, kontribui kaj lerni dume; ne hezitu, simple venu!

## GEJ-anoj ĉe kunveno de landaj ligoj kaj fakaj asocioj

Paul Widzowski

De la 4-a ĝis la 6-a de novembro okazis la kunveno de la landaj ligoj kaj fakaj asocioj (Verbandsrat) en Herzberg am Harz, kie kunvenis ne nur la delegacianoj de diversaj sekcioj de GEA, sed ankaŭ tri GEJ-anoj – unu el ili mi. Fakte, ni nur iĝis tri je sabata kunveno de landaj asocioj en la urba biblioteko de Herzberg, ĉar post labora vendredo kaj malvola vizito al Göttingen mi nur alvenis iom antaŭ la 11-a en la asembleo. La vesperprogramon (precipe la koncerton de Abel Massala) kaj ankaŭ la saluton de la Herzberg-a vicurbestrino mi bedaŭrinde maltrafis.

En kunveno la estraro raportis pri aktualaĵoj, okazintaj post la kongreso en Oldenburg kaj decidis pri loko kaj dato de la venonta kongreso 2024 (post diskuto pri kongreso en Ercmontaro oni decidis okazigi kongreson kune kun francaj esperantistoj en Strasburgo). Ankaŭ la Esperanto-Centro Herzberg kaj la Esperanto-Stacio Halbe kaj fakaj asocioj raportis pri aktualaĵoj.



Lino, Michaela kaj Paul antaŭ la Zamenhof-busto en Herzberg

Pliaj fotoj pri la 30-a KEKSO estas sur la paĝo 31.



Posttagmeze finiĝis la burokratia parto de la kunsido kaj ni rekunvenis en laborgrupojn, unue diskutante la bezonojn de diversaj grupoj (infanoj, junuloj, mezaĝuloj, maljunuloj) kaj komparis ilin kun diversaj Esperanto-renkontiĝoj (kiel JES, NR, Luminesk ktp.), por plibonigi ilin taŭge por iliaj celgrupoj. Due ni preparolis refaron de niaj flugfolioj, el kiuj kelkaj jam iĝis posttempaj:

Ĉu flugfolioj nuntempe plu helpas varbi por Esperanto? Kiel oni alĝustigu ilin al diversaj celgrupoj? Kiel oni hodiaŭigu fasonon sen perdi identigeblecon? Bedaŭrinde ni ne atingis finajn decidojn, tamen prilaboris la proponitajn novajn tekstojn de Lu Wunsch-Rolshoven, por anstataŭigi la malnovan „flugfolio-ĉielarkon“. La vespero finiĝis kun komuna verspermanĝo en restoracio Harzklause.

Dimanĉe la oficiala programo estis finita kaj estis ebleco viziti la framskeletan kastelon kaj Esperanto-kafejon, kie – samkiel je voĵsildoj kaj arboĵsildoj en urbĝardeno – ĉiu teksto estas du- aŭ trilingva, Esperante inkluzive.

## Renovigado de Kostenloser Esperanto-Kurs



## Viktoria Schmidbauer

KEK, la Kostenloser Esperanto-Kurs, estas distanca kurso en PDF-formato por eklerni Esperanton, kiu estas prizorgata de la Germana Esperanto-Junularo. Ĉi-jare kelkaj junuloj, interalie Oda, Tabea, Michaela, Paula, Meriko, Lino, Paul kaj Michael, komencis renovigadon de la dek kursaj lecionoj. Mi enteamiĝis nelonge post ekono de GEJ-anoj ĉe la IJK kaj grandparte transprenis tiun laboron. Ni kune ŝanĝis iom malkonvenan enhavon de la unuaj lecionaj tekstoj kaj voĉregistris ĉiujn tekstojn nove. Mi interalie ĝisdatigis la vortlistojn, ekzercojn, informojn kaj alklakeblajn ligilojn, redaktis tro abundajn aŭ komplikajn klarigojn kaj aranĝis gramatikon en tabelojn. Kvankam estas kurso por komencantoj, mi lernis novan vorton dum la prilaborado de la vortlistoj: kreto.

Nun restas plia trarigardo kaj korektado, antaŭ ol ni baldaŭ povos aperigi novan version en la retejo.

## Komm zum JES und zur Mitgliederversammlung der DEJ!

### DEJ-Vorstand

Liebes DEJ-Mitglied,

wieder geht ein Jahr vorbei und wieder wird ein JES organisiert! Wir sind sehr dankbar, dass diese Arbeit in diesem Jahr federführend von Christine Brücker und Carlos Pesquera Alonso übernommen wurde, denn sonst hätte diesmal kein JES auf die Beine gestellt werden können.

Und deshalb möchten wir dich ganz herzlich einladen, endlich wieder mit uns im größeren Kreis eine riesige Silvester-Party zu feiern! Und nicht nur das, das JES bietet auch viele andere wunderbare Programmpunkte, Konzerte und Ausflüge!

Außerdem findet dort wie gewohnt unsere Mitgliederversammlung statt, nämlich am 30.12. um 11 Uhr. Also nutze die Gelegenheit, um

- bei den anstehenden Vorstandswahlen dabei zu sein und den neuen Vorstand anschließend kennenzulernen,
- zu erfahren, was in diesem Jahr Spannendes passiert ist, und
- mitbestimmen zu können, was die DEJ in Zukunft erreichen möchte.

Du kannst dich beim JES auch an einem DEJ-Strategie-Treffen beteiligen, das einen Tag vor der Mitgliederversammlung, also am 29.12. stattfinden wird. Wir freuen uns auf deine Ideen und Anregungen.

Also melde dich schnell an! Alle weiteren Infos findest du hier: <https://jes.pej.pl>

◀ Ins neue Jahr reinfeiern mit Esperantistinnen? Sei dabei!

Dein Vorstand – Michael, Jan und Michaela  
PS: Falls du nicht zum JES kommen kannst, freuen wir uns über deine virtuelle Teilnahme an der Mitgliederversammlung. Der Zugangslink ist folgender: <https://meet.jit.si/DEJMV2022>

Sag uns Bescheid, wenn du vorhast, auf diesem Wege teilzunehmen, damit wir dich bei eventuellen technischen Problemen unterstützen können.

## Kie estas la eŭforio?

### Henri Schellberg

„Schreiben, drucken, stenographieren, eisenbahnfahren, telegraphieren, telephonieren und internationalisieren<sup>1</sup>. In der That wären meines Erachtens diese sieben Erfindungen als die wahren sieben Wunder der Welt anzusehen.“

La skribmaniero, kiun Leopold Einstein uzas ĉi tie en 1889, estas tre karakteriza por la fruaj manifestoj de la Esperanto-movado: Oni ne nur vidis Esperanton kiel la solvon de la plej grandaj sociaj problemoj (fremdulmalamo, rasismo, la socia demando, milito), sed oni ankaŭ sentis ĝin kiel (nur?) parton de tutkaptanta progressa movado, kiu jam estas ŝanĝanta la mondon al la bono. Ankaŭ Zamenhof priskribas la *internan ideon* de sia lingvo per altaj vortoj: Ĝi estas „sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkitimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimumo nur homon kaj fraton“.

Tiel Esperanto estas unu el la multaj, multaj grandaj vizioj de tiu tempo, la Moderneco. Sed estas malĝuste (kvankam ne malofte) nur nomi la Modernecon la „epokon de utopioj“. Ĉar kiel Zamenhof skribis jam en la unuaj frazoj de la unua libro: „La nun proponatan broŝuron la leganto kredeble prenos en la manojn kun malkonfido,

1 De: Volapük und Lingvo Internacia, 1889. Ĉi tie „internationalisieren“ kompreneble signifas uzi Esperanton, la lingvon internacian.



La Moderneco – ĉu „epoko de utopioj“? Ilustraĵo el libro de Friedrich Eduard Bilz, eldonita en la jaro 1904, kun titolo Der Zukunftsstaat. Staatseinrichtung im Jahre 2000.

kun antaŭe preta penso, ke al li estos proponata ia neefektivebla utopio; mi devas tial antaŭ ĉio peti la leganton, ke li formetu tiun ĉi antaŭjuĝon kaj ke li pripensu serioze kaj kritike la proponatan aferon.“ Ĉi tie memorigas al la maniero, en kiu ankaŭ Marx kaj Engels ĉiam distingis inter sia realisma „sciencia socialismo“ kaj la „utopia socialismo“ de la aliaj, kiuj prefere pensas pri idealismoj ol pri ilia praktikebleco. Ne, la aparta afero pri la Moderneco do ne estis, ke oni utopie deziris la paradizon sur tero, aŭ antaŭdiris per leĝoj<sup>2</sup> ĝian venon en proksima estonteco. Kiel multaj teoriistoj (ekz. Karl Popper en *Die offene Gesellschaft und ihre Feinde*) poste konstatis, ekzistis tia ideo jam en la kristane-feŭda Mezepoko: la *lasta juĝo*, kiun oni antaŭdiris ĉiam por proksima estonteco kaj kiu ne laŭe portos la ĉielon al tero<sup>3</sup>. La sola novaĵo pri la Moderneco do nur estis, ke nun la racia, homa planado estis rekonita kiel la taŭga ilo por socia kaj natura ŝanĝo, por krei pli bonan mondon.

Ĉi tiu nova kredo de la homo en sia propra kreokapablo devenis, depende de kiun oni demandas, aŭ de nova kvazaŭ-religia doktrino, kiu nun, post kiam Nietzsche deklaris Dion mortinta, anstataŭe metis la homon en la ĉielon kiel kreisto de sia propra historio, kontraste al la pasiva naturo (vidu ĉe Michel Foucault en *Les mots et les choses* [La vortoj kaj la aĵoj]: „Antaŭ la fino de la 18-a jarcento, la homo ne ekzistis.“). Aŭ la nova kredo devenis de tio, ke en la tempo de la industria revolucio homoj subite kun senprecedenca rapideco – per laboro de siaj propraj manoj, palpeble kaj videble sen helpo de dioj – ŝanĝis sian socion kaj mondon nekredinde profunde (vidu ĉe Guy Debord en *La société du spectacle* [La socio de la spektaklo]: „La evoluo de la produktivaj fortoj krevigis la malnovajn produktadajn rilatojn, kaj ĉiu stabila ordo disfalis al polvo. Ĉio, kio estis absoluta, fariĝas historia.“). De kie ajn ĝi venas: Ekestis kredo je progreso, sed pli precize en la homfarita: Je tio, ke ni havas la kapablon realigi niajn revojn. Je tio, ke homaj socioj povas esti ŝanĝataj laŭplane.

Sed (ne nur en la kazo de Esperanto) ĉi tiu kredo senteble iam estis perdita. Kiu hodiaŭ parolas pri la grandaj ideoj de la Moderneco – planurboj, planlingvoj, plansocioj – ofte ricevas ridadon. Eĉ movadoj de tiu epoko, kiuj ankoraŭ ekzistas, kiel la Esperanto-movado, rakontas pri siaj propraj historioj plejofte almenaŭ ironie. Io ŝanĝiĝis, la hodiaŭa „Zeitgeist“ enhavas profundan skeptikemon pri grandaj projektoj. Pri ĉi tiu multaj teoriistoj<sup>4</sup> konstatas, ke en la tempo ĉirkaŭ la du mondmilitoj, rigardante la faŝismon kaj poste influite de la postkolonia movado kaj

2 Alia paralelo al marksismo: En la sama manifesto por Esperanto, Leopold Einstein skribis: „Der Fortschritt [ist] der Natur eingeboren.“ Marx ankaŭ kredis je laŭleĝa antaŭvidebleco de la socia estonteco: „[La] venko de la proletaro estas neevitebla.“

3 Interese, eksplicite religiaj referencoj kun iomete mesiana noto troviĝas ankaŭ kaj en la privataj tekstoj de la inventisto de Volapuko, Johann Martin Schleyer, kaj, tamen multe pli modeste, en la tekstoj de nia iniciatoro, L. L. Zamenhof.

4 ekz. Jameson: Postmodernism, or The Cultural Logic of Late Capitalism. Harvey: The Condition of Postmodernity.



de la seksa revolucio, komenciĝis nova epoko, kritikanta la Modernecon: La Postmoderneco. Anstataŭ grandegaj revolucioj oni nun nur plu kredas je malgrandetaj reformoj. Anstataŭ kolektiva kreokapablo metiĝas la individua mempotencigo. Do ankaŭ kolektivaj projektoj estas anstataŭigitaj per privataj hobiaj kaj „me time“.

Se oni hodiaŭ demandas esperantistojn, kial ili lernis aŭ lernas Esperanton, oni plejofte aŭdas malpli grandajn vortojn. Por persone renkonti novajn homojn ekzemple. Aŭ pro la familiara spaco, kiu ja enhavas grandajn diversecojn de homoj, sed tamen maksimume kontribuas tre malmulte al mondpaco, apenaŭ al la granda vizio aboli militon kaj rasismon.


Unuflanke ĉi tio estas pravigita. Rigardante la tiamajn planurbojn, planlingvojn, plansociojn, ili havas multajn komunajn erarojn: subkompleksa kompreno de homaj socioj, eŭrop- kaj virocetra mondkoncepto kaj super ĉio: Ili provas fiksi la socion senmove laŭ iliaj imagoj. Ankaŭ Esperanto havas ĉi tiujn problemojn: Certe la ideoj de Zamenhof pri la kapablo de Esperanto estis sufiĉe naivaj. Lia fokusiĝo je la „kulturaj lingvoj“, indaj por doni vortojn, estas rasisma kaj eŭropcentra, la -in-sufikso kaj la pronomsystemo estas seksismaj. Kaj la ideo, ke oni devus doni neŝanĝeblan „fundamenton“ al internacia lingvo, konfliktas kun la eco de homaj socioj, ke ili ĉiam ŝanĝiĝas en neantaŭvidebla maniero.

Sed tamen: Ni pli kaj pli atingis sakstraton. Fredric Jameson priskribis nian hodiaŭan cinikismon koncerne al socia ŝanĝo (vidalvide al krizoj, kiuj necesigas sociajn ŝanĝojn) iam tiel: „Estas por ni pli facile imagi la finon de la mondo ol imagi la finon de la kapitalismo.“ Certe ni povas diri, koncerne Esperanton: „Estas por ni pli facile imagi la finon de la mondo ol imagi la finon de la angla kiel internacia lingvo.“ Ni do bezonas ilin urĝe, la novajn grandajn ideojn, la novan eŭforion. Kie ni do povas trovi ilin?

## „Ich kann yetzo nit mee ...“ – Recenzo pri ekspozicio en la Stutgarta Ŝtata Ĉefarkivo

Paul Widzowski

Johannes Reuchlin (1455–1522) estis humanisto kaj klerulo, samtempe ankaŭ diplomato kaj advokato en la servo de grafo Eberhard la 1-a de Virtembergo. Al li, ankaŭ konata kiel „Capnio“ (renesanctempa vortludo: Reuchlin



### ◀ Letero, sendita de Johannes Reuchlin al sia samtempulo kaj amiko Sebastian Brant.

signifas „Räuchlein“: fumeto; greke kapnion) estas dediĉita ekspozicio en la Ŝtata Ĉefarkivo de Stutgarto por marki la 500-an datrevenon de lia morto ĉi-somere. En la ekspozicio, la arkivo, kune kun la Ŝtata

Biblioteko de Virtembergo, memorigas la studojn kaj vojaĝojn de Reuchlin, kiujn oni povas spuri en travojaĝo de la ekspozicio uzante diversajn eksponaĵojn – de simpla elspezraporto ĝis la impona hebrea Biblio.

La ekspozicio komence akustike bonvenigas siajn vizitantojn: La vestiblo de la arkivo invitas vin aŭskulti kvin el la fruaj novaltgermanaj leteroj de Reuchlin. El tiuj leteroj venas ankaŭ la titolo de la ekspozicio „Ich kann yetzo nit mee ...“ („Mi nun ne povas plu ...“) – Reuchlin tiel elĉerpita finis sian raporton pri la vojaĝo al la kronado de Maksimiliano la 1-a en Aachen/Akeno en 1486, kiun la ambasadoro de Virtembergo sendis al sia grafo priskribante la ceremonion: elekto per la princelektistoj, sedigo sur altaro, festado. Flanke, Reuchlin priskribis la relikvaĵojn kiel la „vindaĵojn de Jesuo“ kaj pagis ĉirkaŭ 30 guldojn, kiujn li notis por ricevi ilin de la grafo. La verko de Reuchlin ankaŭ estas traspekta akustike en la ekspozicio mem: la „Kantillationes“ de Reuchlin (melodiaj frazoj kiuj akcentas la legadon de la Torao) submetas la ekspozicion kiel kvarvoĉa humanisma odo. Tiu muzike strangeta kaj teologie signifiĝanta interpreto de religia materialo, kiu estis tipa por lia nuntempa gusto, montras Reuchlin kiel unu el la unuaj kristanaj hebreistoj en Eŭropo.

Reuchlin kiel defendanto de la judoj de la imperio estas – kiel montras surfaca interreta serĉo – la plej konata parto de la biografio de la (alie ombrigiĝinta) humanisto hodiaŭ: Reuchlin kontraŭbatalis kampanjon, kurantan ekde 1507 de diversaj ekleziestroj kaj kontraŭjudista polemikisto Johannes Pfefferkorn, kiu en 1509 sukcesis persvadi imperiestron Maksimiliano lasi judajn librojn esti konfiskitaj. En disputo, daŭranta plurajn jarojn, kiu ne estas konsiderita plu en la ekspozicio, Reuchlin sukcesis gajni publikon al sia flanko. En ĉi tiu fono, la hebrea parto de la privata biblioteko de Reuchlin havas specialan signifon: Valora hebrea Biblia manuskripto, donaco de imperiestro Frederiko la 3-a kiel adiaŭo al Reuchlin de la imperiestra kortego en 1492, kune kun presadoj de la skribaĵoj „De arte cabalistica“ (provo kombini la Kabalo-n kun greka filozofio) kaj „De rudimentis hebraicis“ (unua „kristana“ gramatiko de la hebrea) atestas pri tio.

Stutgarto estas taŭga loko por ekspozicio pri Reuchlin. Li vojaĝis el Stutgarto kiel ambasadoro de la Grafo de Virtembergo, intertraktante kun la Papo, tien li revenis post sia ekzilo en la Palatinato en Hajdelbergo, tie lia

domo povus – se ĝi estus ankoraŭ staranta – oferti memorlokon. Fakte, la memorŝildo nuntempe estas fiksita je la najbara domo. (Ĝi ankoraŭ povas esti komprenita sur reproduktaĵo de Merian-a kuprogravuro montrata reproduktaje.) En la Stutgarta arkivo, liaj leteroj estas konservitaj inter la dosieroj de grafo-duko Eberhard kaj li estas entombigita en la Stutgarta Leonhard-preĝejo, kie staras trilingva memorŝtono al la „plej bona el ĉiuj ŝvaboj, (...) unika ornamajo de triobla lango“, kiel priskribis lin lia samtempulo Sebastian Brant.

La ekspozicio restas ankoraŭ malferma ĝis la 16-a de decembro. Publikaj gvidoj okazas ĉiumerkrede je 11h30.

## Raporto de KKPS kaj seminario pri mastrumado de organizoj

Jonas Schulz (Lino)

Kiel ĉiam, mi prokrastis skribi la ·kune·-artikolon ĝis la fino de la redakcia limdato. Do nun mi skribas tiun ĉi tekston en trajno kaj ege provas memori, kio fakte okazis dum KKPS kaj la trejnado pri mastrumado de junularaj asocioj postpandemie. Mi menciis, ke KKPS estas renkontiĝo, kiu ĉiujare okazas en Nederlando dum Haloveno. Kaj dum la Halovena vespero okazas amuza kostumbalo.

La plej grava memoro, kiu kovras la aliajn memoraĵojn, estas la nokta naĝado de skolto en malpura kanalo dum la Halovena balo. La ejastrinaĉo ege malŝatis tion, kaj nun la Esperanto-movado estas malpermesita en la ejo. Krom tiu memorinda afero okazis multe da ludado kaj umado, kiu kutimas en renkontiĝoj. Indas menciigi, ke la miksaĵo de familioj, junuloj, mezaĝuloj kaj maljunuloj vere kreis mirindan etoson dum la KKPS.

Dum la renkontiĝo okazis la menciita seminario. Ni celis akceli ideojn, kiujn junularaj asociaj bezonas en la postpandemia epoko. La rezultoj de la seminario bezonus



Dum la seminario pri mastrumado de junularaj asocioj.

propran artikolon, sed mallonge resumite: Ni varbu rete junajn retemajn esperantistojn, kiuj esperantiĝis dum la pandemio kaj ne estas anoj de Esperanto-organizaĵoj, kaj ni kreu mojosan novuleman etoson dum renkontiĝoj.

Ĉi-jara KKPS estis tre primemeinda.



Lumaj artaĵoj dum nokta promenado en Kirkel (1/3)



Lumaj artaĵoj dum nokta promenado en Kirkel (2/3)



Lumaj artaĵoj dum nokta promenado en Kirkel (3/3)

## PSI 2023 en Wittenberg Fine denove renkontiĝi reale

Printempa Semajno Internacia (PSI) estas aranĝo de Germana Esperanto-Asocio GEA, kiu okazas ĉiam ĉirkaŭ Pasko (*psi.esperanto.de*).

**W**ittenberg estas historie kaj kulture ege ekscita, kaj la regiono ofertas tre interesajn ekskurscelojn, inkluzive de la „Bauhaus“-urbo Dessau kaj la Parko de Wörlitz. Al la PSI estas invitataj geamikoj de la Esperanto-lingvo kaj -kulturo de ĉiuj aĝoj el Germanio kaj el eksterlando. Esperanto-komencantoj estas varme bonvenaj kaj ĉiam povas partopreni en kurso por komencantoj, progresantoj ankaŭ ricevos siajn ofertojn.

Ni aparte bonvenigas junulojn kaj familiojn kun infanoj unuflanke kaj partoprenantojn el eksterlando aliflanke, ĉar: la estonteco apartenas al infanoj kaj gejunuloj, kaj komunikado kun eksterlandaj homoj estas esenca elemento de nia Esperanto-kulturo. Dum la matenoj de la PSI-semajno ĉiam okazas prelegoj, lingvokursoj kaj manlaboroj, posttagmeze kutime pluraj ekskursoj estas ofertataj paralele. Vespere estas ofte ludoj, kulturaj agadoj kaj memkompreneble nia renkontejo en la knajpo.

Por la PSI-semajno 2023 (3a–10a de aprilo 2023) ni povis rezervi por ni la tutan junulargastejan konstruaĵon en Wittenberg (<http://djh.de/3a31d8a636>). Tamen ni povas konservi ĉi tiun rezervon de la tuta domo nur, se almenaŭ 60 partoprenantoj aliĝas ĝis la 15-a de januaro 2023. Aliĝoj ĉiam eblas ĉe *psi.esperanto.de*.

Ankoraŭ unu noto: se la PSI devis esti nuligita en la pasinteco pro la korona pandemio, la jam pagitaj kostoj estis ĉiam plene repagitaj.

Do: helpu reaktivigi la PSI kaj aliĝu kiel eble plej baldaŭ – *psi.esperanto.de/#alighi*.

Ni – la PSI-teamo – antaŭĝojas revidi vin aŭ konatiĝi kun vi en Wittenberg, tiam ni havos agrablan semajnon en Wittenberg.

**Stefan Kriehoff & Ralf Haumer**  
nome de la PSI-organiza teamo



## PSI 2023 in Wittenberg Endlich mal wieder real treffen

Die Internationale Frühlingswoche (PSI = Printempa Semajno Internacia) ist eine Veranstaltung des Deutschen Esperanto-Bundes D.E.B., die immer um Ostern stattfindet (*psi.esperanto.de*).

**2**023 wird das PSI in der Lutherstadt Wittenberg ([www.wittenberg.de](http://www.wittenberg.de)) stattfinden. Wittenberg ist historisch und kulturell höchst spannend, und die Region bietet sehr interessante Ausflugsziele, u. a. die „Bauhaus“-Stadt Dessau und den Wörlitzer Park. Eingeladen zum PSI sind Freunde der Esperanto-Sprache und -Kultur aller Altersgruppen aus dem In- und Ausland. Esperanto-Anfänger werden warm aufgenommen und können immer an einem Anfängerkurs teilnehmen, Fortgeschrittene kommen gleichermaßen auf ihre Kosten.

Besonders heißen wir zum einen Jugendliche und Familien mit Kindern und zum anderen Teilnehmer aus dem Ausland willkommen, denn: Kindern und Jugendlichen gehört die Zukunft, und die Kommunikation mit Menschen aus dem Ausland ist ja nun gerade ein wesentliches Element unserer Esperanto-Kultur. Während der Vormittage der PSI-Woche überwiegen immer Vorträge, Sprachkurse und Bastelangebote, an den Nachmittagen werden i. A. mehrere Ausflüge parallel angeboten. An den Abenden wird viel gespielt, es gibt dort Kulturangebote und natürlich unseren Treffpunkt in der Kneipe.

Für die PSI-Woche 2023 (3.–10. April 2023) konnten wir das Haus der Jugendherberge in Wittenberg (<http://djh.de/3a31d8a636>) vollständig für uns reservieren. Diese Reservierung des kompletten Hauses können wir aber nur aufrechterhalten, wenn sich bis zum 15. Januar 2023 mindestens 60 Teilnehmer angemeldet haben. Anmeldungen sind immer möglich unter *psi.esperanto.de*.

Ein Hinweis noch: Wenn das PSI in der Vergangenheit wegen der Corona-Pandemie abgesagt werden musste, wurden die bereits bezahlten Kosten immer vollständig zurückerstattet.

Also: Helft mit, das PSI zu reaktivieren, und meldet Euch so bald wie möglich an – *psi.esperanto.de/#alighi*.

Wir – das PSI-Team – freuen uns, Euch in Wittenberg wiederzusehen oder kennen zu lernen, dann machen wir uns eine schöne Woche in Wittenberg.

**Stefan Kriehoff & Ralf Haumer**  
im Namen des PSI-Orga-Teams